# *Kuba prezidento akceptis gvidanton de la komunista partio de Hispanio*

Image not found or type unknown

Havano, feb 10 (RHK) La unua sekretario de la Komunista Partio de Kubo (PCC) kaj prezidento de la Respubliko, Miguel Díaz-Canel, akceptis ?i-merkredon en ?i tiu ?efurbo la prezidanton de la Komunista Partio de Hispanio, José Luis Centella Gómez.

En kunveno okazinta en la Palaco de la Revolucio, amba? gvidantoj faris fratan dialogon en kiu ili traktis temojn rilatajn al regionaj kaj internaciaj eventoj, raportas hodia? la ?urnalo Granma.

La prezidento dankis la hispanan komunistan gvidanton pro lia konstanta subteno por alfronti la ekonomian, komercan kaj financan blokadon trudita de la usona registaro kontra? la kariba nacio, plifortigita en tempoj de pandemio.

Siaflanke Centella emfazis la varman bonvenigon ricevitan dum ?i tiu nova vizito al Kubo kaj ripetis la solidarecon de sia Partio en la batalo kontra? la blokado kaj la amaskomunikilaj kampanjoj kontra? la Insulo.

En la renkonti?o partoprenis anka? Manuel Pineda, sekretario pri Internaciaj Rilatoj de la Hispana Komunista Partio, kaj Gloria Aguilar, prezidantino de la Internacia Solidareca Asocio Patricio Lumumba.

Flanke de Kubo ?eestis  membroj de la Politika Buroo Roberto Morales Ojeda, sekretario pri organizo, kaj Bruno Rodríguez Parrilla, ministro pri eksteraj aferoj, kaj Ángel Arzuaga Reyes, vicestro de la departemento pri internaciaj rilatoj de la Centra Komitato de PCC.

Dum sia restado en Kubo, la hispana komunista gvidanto anka? efektivigis ampleksan programon, kiu inkludis renkonti?ojn kun politikaj kaj registaraj a?toritatoj kaj vizitojn al lokoj de historia kaj socia intereso.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/285682-kuba-prezidento-akceptis-gvidanton-de-la-komunista-partio-de-hispanio

RADIO HABANA CUBA

**Radio Habana Cuba**